


V 5478/2920
INTERNACIA KATOLIKA

Esperanto

UNUIĜO ESPERANTISTA



JARLIBRO 1928

AD MAJOREM DEI GLORIAM

JARLIBRO

DE LA

INTERNACIA
KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA

Fondita la 1-an de Aprilo 1910
de Pastro RICHARDSON

1928

J. Paweł Bieliński



JESU-KRISTO
LA REĜO DE ĈIUJ POPOLOJ

Al la Membroj de IKUE

Eindhoven (Nederlando), 1-1-28.

Karaj IKUE-anoj!

Jen la duaj arlibro, kiun nia Internacia Unuigo povas havigi al siaj membroj. Mi esperas, ke ĝi al Vi estas bonvena, kaj ĉiam Vin memorigos pri la rajtoj, kiujn Vi havas en nia organizaĵo, sed ankaŭ pri la devoj, kiujn Vi certe kiel vera kaj plenkonvinka katolika esperantisto kun ĝojo plenumos.

Rajtoj.

Se Vi estas membro de katolika Landa Ligo Esperantista, apartenanta al IKUE, Vi rajtas kun la aliaj liganoj elekti du membrojn de la Internacia Komitato por en ĝi reprezenti Vian landon. Kaj, ĉar tiuj Komitatanoj elektas la membrojn de la Ĉefestraro de IKUE, kaj voĉdonas pri la proponoj dum la ĝenerala kunveno, ĉiujare okazanta dum nia kongreso, Vi tiel ankaŭ influas tiujn elektojn kaj voĉdonadojn.

Vi rajtas fari proponojn por nia ĝenerala kunveno, kaj la ĉefestraro multe ŝatas, ke la membroj uzadas tiun rajton, ĉar tio montras, ke la membroj kunvivas la organizan vivon, kiu tiel estas pli floranta kaj vigla.

Vi rajtas uzi la servojn de nia Serva Organizado, kaj la ĉefestraro multe ŝatas, ke pli ofte oni uzas tiun rajton, ĉar tiel la konsuloj povus des pli konvinkige montri sian helpemon kaj la utilon de nia organizaĵo.

Devoj.

Jes, ankaŭ devojn havas la IKUE-ano, sed tiuj devoj estas facile plenumebraj. Kiu estas membro de sia Landa Ligo de katolikaj esperantistoj, eĉ ne bezonas pagi kotizon al IKUE, ĉar la Landa Ligo tion por li faras. Kiu ne estas membro de tia Ligo, ĉar ĝi ne ekzistas, tiu nur bezonas pagi al la *korespondanto* de IKUE en sia lando la malgrandan sumon, kiu egalvaloras la afrankkostojn de *du* eksterlandaj leteroj. Tiu jarkotizo certe ne estas tro alta. Jam nia jarlibro valoras plene tiun sumeton.

Alia devo, multe pli grava, de IKUE-ano estas : ke li legu la oficialan organon *Espero Katolika*. Facila devo, ĉu ne? Jes : la legado. Sed, por legi ĝin, oni devas ĝin ricevi. Kaj nur tiuj ĝin ricevos, kiuj ĝin abonis. Kaj la

abono kostas poĵare 25 francajn frankojn aŭ egalvaloron.

Ĉu tro alta tiu abono? Bonvolu ĝin kompari kun aliaj Viaj elspezoj, ĉu por Esperanto, ĉu por aliaj eble multe malplivaloraj aferoj, kaj Vi certe konsentos, ke la saman sumon Vi ne pli bone povas elspezuzi, ol por *Espero Katolika*. Sed, vi eble bezonas ĉiujn Viajn enspezojn por vivnecesaĵoj. Povas esti. Kaj pro tio Vi des pli bonvena estas en niaj rangoj. La malriĉuloj ja estas la specialaj amikoj de Dio. Sed pro tio mi havas la konvinkon, ke neniu abonanto de E. K. inter Viaj konatuloj rifuzos Vian peton, kiam Vi deziras pruntelegi regule la E. K.-numerojn, kondiĉe, ke Vi regule ilin redonos kaj ne fuŝas.

Kaj al la riĉuloj inter niaj membroj mi demandas : Ĉu Vi volas helpi samtempe Viajn malriĉajn kunmembrojn kaj nian organon? Ĉu jes? Bone! Jen mia konsilo : Sendu monon por jarabono al *Espero Katolika*, sendota al IKUE-ano, kiu memforte ne povas aboni. La E. K.-administracio certe plenumos Vian peton, kaj Dio Vin benos.

Tria devo de niaj membroj estas : varbi novajn membrojn. Ho, al konvinka IKUE-ano ne estas malfacile konvinki aliajn katolikajn gesamideanojn, ke ilia loko estas speciale en nia Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

Feliĉe, nia organizaĵo mirinde kreskas. Jen statistiko tiurilate pri la lastaj kvar jaroj :

<i>En la jaroj :</i>	<u>1924</u>	<u>1925</u>	<u>1926</u>	<u>1927</u>	
ni havis :	542	557	766	1231	membrojn
en :	13	18	19	23	diversaj landoj.

Kaj la membrolisto de ĉi-tiu jarlibro montras, ke jam depost nia Dekdua Kongreso (la ĉi-suprajn ciferojn mi ĉerpis el la kongresraportoj) kreskis la membronombro kaj la nombro de la landoj.

Tamen, komparante la nunan staton de nia membrolisto kun la grandega nombro de la katolikaj esperantistoj en la mondo, ni bedaŭrinde devas konstati, ke multaj, tre multaj el niaj katolikaj samideanoj ĝis nun forrestis el niaj rangoj, kaj pro tio estas kulpaj, ke la katolika esperantista organizaĵo ĝis nun ne havas tiun influon en la ĝenerala esperantista movado, kiun ĝi rajtas. Helpu nin, karaj amikoj, helpu nin, kaj ne ripozu antaŭ ke la lasta katolika esperantisto estas membro de IKUE. La Dia beno estu kun Vi dum la jaro 1928 !

La Ĝenerala Sekretario de IKUE,

P. A. SCHENDELER,

Prins Hendrikstr. 30-c, Eindhoven (Nederlando).

JANUARO

MONATO DE LA SANKTEGA NOMO DE JESUO.

Dimanĉo.....	1	8	15	22	29
Lundo.....	2	9	16	23	30
Mardo.....	3	10	17	24	31
Merkredo....	4	11	18	25	
Ĵaŭdo.....	5	12	19	26	
Vendredo....	6	13	20	27	
Sabato.....	7	14	21	28	

NOTOJ

Ĉi-monate almenaŭ varbu unu membron por IKUE !

Mi venis por alporti fajron sur la teron, kaj kiom mi deziras, ke ĝi ekbruliĝu !

FEBRUARO

MONATO DE LA SEP DOLOROJ DE MARIO.

Dimanĉo.....		5	12	19	26
Lundo.....		6	13	20	27
Mardo.....		7	14	21	28
Merkredo....	1	8	15	22	29
Ĵaŭdo.....	2	9	16	23	
Vendredo....	3	10	17	24	
Sabato.....	4	11	18	25	

NOTOJ

Ne forgesu pagi Vian kotizon!

Amon oni multe predikas, sed malmulte praktikas.

MARTO

MONATO DE SANKTA JOSEFO.

Dimanĉo.....		4	11	18	25
Lundo.....		5	12	19	26
Mardo.....		6	13	20	27
Merkredo....		7	14	21	28
Ĵaŭdo.....	1	8	15	22	29
Vendredo....	2	9	16	23	30
Sabato.....	3	10	17	24	31

NOTOJ

Kasistoj de lokaj kluboj! Vi sufiĉatempe enkasigu la kotizon de Viaj membroj, kaj ĝin sendu al la kasisto de la Landa Ligo!

Ĉiu loko, kiu ne estas okupata de la bono, estas venko de la malbono.

APRILIO

MONATO DE LA SANKTA FAMILIO.

Dimanĉo.....	1	8	15	22	29
Lundo.....	2	9	16	23	30
Mardo.....	3	10	17	24	
Merkredo....	4	11	18	25	
Ĵaŭdo.....	5	12	19	26	
Vendredo....	6	13	20	27	
Sabato.....	7	14	21	28	

NOTOJ

Sekretarioj de Landaj Ligoj! Sendu antaŭ la unua de majo la kotizon kaj membroliston al la Ĝenerala Sekretario de IKUE!

Nur tiu rajtas porti la nomon de vera IKUE-ano, kiu regule abonas kaj legas la oficialan organon Espero Katolika!

MAJO

MONATO DE LA SANKTA VIRGULINO MARIO.

Dimanĉo.....		6	13	20	27
Lundo.....		7	14	21	28
Mardo.....	1	8	15	22	29
Merkredo....	2	9	16	23	30
Ĵaŭdo.....	3	10	17	24	31
Vendredo....	4	11	18	25	
Sabato.....	5	12	19	26	

NOTOJ

Konsuloj de IKUE! La amo al Dio orumu Vian helpemon al nia samideanaro! Ĝia brilo altiros la Esperantistojn al IKUE!

Ho, kiom granda estus la potenco de la katolikoj sur la teritorio de la BONO, se ni ĉiuj vivus, kiel decas al katoliko!

JUNIO

MONATO DE LA SANKTEGA KORO DE JESUO.

Dimanĉo.....	3	10	17	24	
Lundo.....	4	11	18	25	
Mardo.....	5	12	19	26	
Merkredo....	6	13	20	27	
Ĵaŭdo.....	7	14	21	28	
Vendredo....	1	8	15	22	29
Sabato.....	2	9	16	23	30

NOTOJ

Se Vi mem ne povas ĉeesti Nian Dektrian, Vi almenaŭ instigu aliajn al partopreno, kaj ilin helpu laŭpove al tiu celo.

Ĉu Vi manĝas, ĉu Vi trinkas, Vi ĉion faru por la honoro de Dio.

JULIO

MONATO DE LA PLEJVALORA SANGO DE JESUO.

Dimanĉo.....	1	8	15	22	29
Lundo.....	2	9	16	23	30
Mardo.....	3	10	17	24	31
Merkredo....	4	11	18	25	
Ĵaŭdo.....	5	12	19	26	
Vendredo....	6	13	20	27	
Sabato.....	7	14	21	28	

NOTOJ

Ĉu vi nenion forĝesis?

Helpu ĉie kaj ĉiel kaj ĉiam la katolikan gazetaron! Vi, katolikaj Esperantistoj, helpu ĉie kaj ĉiel kaj ĉiam Vian gazeton Espero Katolika.

AŬGUSTO

MONATO DE LA PLEJPIURA KORO DE MARIO.

Dimanĉo.....		5	12	19	26
Lundo.....		6	13	20	27
Mardo.....		7	14	21	28
Merkredo....	1	8	15	22	29
Ĵaŭdo	2	9	16	23	30
Vendredo....	3	10	17	24	31
Sabato	4	11	18	25	

NOTOJ

Rimedo ne estas malbona, ĉar ĝi estas nova, aŭ ĉar la malvirtuloj ĝin unue uzis. Bona estas ĉiu rimedo, kiu ne estas malinda je Via persona rango, kaj ne kontraŭas la sanktecon de nia doktrino.

SEPTEMBRO

MONATO DE LA SANKTAJ GARDANĜELOJ.

Dimanĉo....		2	9	16	23	30
Lundo.....		3	10	17	24	
Mardo.....		4	11	18	25	
Merkredo....		5	12	19	26	
Ĵaŭdo		6	13	20	27	
Vendredo....		7	14	21	28	
Sabato	1	8	15	22	29	

NOTOJ

Atente legu la raportojn pri Nia Dektria en *Espero Katolika*.

Ekzistas urĝa bezono al katolika Esperanto-literaturo. Ni tial apogu la klopodojn de la Societo Sankta-Mihaelo. Legu la informojn sur paĝo 115.

OKTOBRO

MONATO DE LA SANKTA ROZARIO.

Dimanĉo.....		7	14	21	28
Lundo.....	1	8	15	22	29
Mardo.....	2	9	16	23	30
Merkredo....	3	10	17	24	31
Ĵaŭdo.....	4	11	18	25	
Vendredo....	5	12	19	26	
Sabato.....	6	13	20	27	

NOTOJ

Ĉiam propagandu nian movadon en Via rondo.

Ĉiun semajnon iom da mono apartigu, por ke almenaŭ unufoje dum Via vivo al Vi estu eble ĉeesti kongreson de IKUE.

NOVEMBRO

MONATO DE LA MEMORO AL LA FORMORTINTOJ.

Dimanĉo.....		4	11	18	25
Lundo.....		5	12	19	26
Mardo.....		6	13	20	27
Merkredo....		7	14	21	28
Ĵaŭdo.....	1	8	15	22	29
Vendredo....	2	9	16	23	30
Sabato.....	3	10	17	24	

NOTOJ

Kiom da abonantoj Vi jam varbis por *Espero Katolika*?

Memoru en Viaj preĝoj la formortintajn gesamideanojn. Preĝu, ke ili ne ĉesu helpi nian movadon, kaj... imitu ilian ekzemplon!

DECEMBRO

MONATO DE LA INFANETO JESUO.

Dimanĉo...	2	9	16	23	30
Lundo.....	3	10	17	24	31
Mardo.....	4	11	18	25	
Merkredo...	5	12	19	26	
Ĵaŭdo.....	6	13	20	27	
Vendredo...	7	14	21	28	
Sabato.....	1	8	15	22	29

NOTOJ

Ĉu Vi jam reabonis al *Espero Katolika*?

Kiom da abonantoj Vi jam varbis por nia bela, bona, leginda, apoginda, necesega, oficiala organo Espero Katolika?

Em. PELTIER

la iniciatinto de la internacia katolika
Esperanto-organizo

La jaro 1927 estis jubilea jaro por la tutmonda Esperantistaro. Precize la 26 julio 1927 ja estis pasintaj kvardek jaroj de la tago, en kiu publike eliris la unua esperanta libro de D-ro Esperanto: «Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj plena lerno-libro» (por Rusoj).

Eta ĝermo, el kiu kreskis kaj de jaro al jaro pligrandiĝis la ĝenerala Esperanto-movado, ampleksanta nun la tutan terglobon. Por la katolikaj esperantistoj tiu-ĉi jaro estis duoble jubilea, ĉar la saman kvanton da jaroj havas post si la speciala katolika Esperanto-movado.

Ĉu vere?

Ni jese respondas.

Tuj post kiam aperis sinsekve la unuaj lerno-libroj kaj vortaroj de D-ro Esperanto (L. L. Zamenhof) por Rusoj (la 26 julio 1887), por Poloj (la 6 septembro 1887), por Francoj kaj Germanoj (la 24 novembro 1887), D-ro Zamenhof trovis en Polujo kaj Rusujo multajn adeptojn, kiuj favorege propagandis la novan lingvon internacian, inter ili Wasniewski, Grabowski, Kofmann, Gernes, Zinovjev kaj Postnikov.



Ankaŭ kelkaj kleraj katolikoj — laikoj kaj pastroj — ekkomprenis la gravecon de tiu lingvo, kaj komencis fervore propagandi ĝin en siaj rondoj, inter ili *la episkopo Zerr en Saratov*, kaj la profesoro nuntempe *prelato A. Dombrowski en Kaŭnas*.

Sed en la vastega rusa imperio tiuj unuaj dise loĝantaj katolikaj Esperanto-pioniroj ne povis efike propagandi la ĵus kreitan helplingvon inter siaj samreligianoj. Estis ankaŭ al ili ne eble, krei esperantan organizon, ĉar en Rusujo pro eksteraj cirkonstancoj estis malpermesite al la katolikoj, fondi ian societeton. Tial ĉiu laboris, ankaŭ por Esperanto, nur izole, laŭ propraj opinio kaj plano. Tamen la estiĝinta katolika Esperantomovado progresadis en Rusujo, ja malrapide, sed konstante, ĝis kiam ĝi atingis eĉ la limojn de la imperio. Tie ĝi ne haltis. Ĝi transpaŝis la limojn kaj enradikiĝis unue en Francujo.

En tiu lando, fervora katoliko, *Ludoviko de Beaufront*, ekfaris viglan kaj vigitan propagandon por la lingvo internacia de D-ro Zamenhof, tiam jam nomata *Esperanto*, ne nur ĝenerale, sed ankaŭ speciale inter katolikoj. Ne timante obstinajn kontraŭdirojn kaj malverajn asertojn, ekz., ke Esperanto estas elpenaĵo de la infero, lingvo de la hebreoj, framasonoj, sendiuloj, senpatrujanoj, anarhistoj, ktp., li daŭrigis forte la propagandon. Kiel simbolojn de la Esperantomovado li iniciatis la uzadon de la *verda koloro* kaj la portadon de *kvinpinta verda stelo*. Por la katolikoj li verkis kun aprobo de la ĉefepiskopo

de Reims, kardinalo Langénieux, la *unuajn Esperanto-pregareton*, prezentitan en 1906 al Lia Papa Moŝto Pio X-a.

Al la franca Esperanto-propaganda societo, fondita de L. de Beaufront, aliĝis ankaŭ multaj katolikoj, precipe tial, ke L. de Beaufront en ĝia monata gazeto *L'Espérantiste* povis pritrakti en la franca kaj esperanta lingvoj ankaŭ katolikajn aferojn kaj demandojn.

Sed kiam la nombro de katolikaj esperantistoj pligrandiĝis en Francujo kaj en aliaj landoj, la spaco, pri kiu L. de Beaufront povis disponi en *L'Espérantiste* jam ne sufiĉis por diskutado de ĉiuj katolikaj aferoj. Tial oni baldaŭ eksentis la bezonon, fondi specialan *katolikan Esperanto-societeton* kaj propran *katolikan Esperanto-gazeton*. Ne longe la katolikoj devis sopiri al iu taŭga viro, kiu fondis ambaŭ, la societeton kaj la gazeton.

Tiu viro estis 32-jara pastro, Emile Peltier, esperantisto ja nur de kelkaj monatoj, sed fervora, laborema kaj oferema adepto de la nova internacia helplingvo, al kiu iun tagon en la jaro 1902 iu esperantisto skribe proponis fondon de societo speciale celanta la disvastigon de Esperanto inter katolikoj. Emile Peltier akceptis tiun proponon, kaj realiginte ĝin, li farigis la iniciatinto de la internacia katolika Esperanto-organizo.

Emile Peltier naskiĝis la 17 septembro 1870 en la franca vilaĝo *Villandry*. De siaj infanaj jaroj li jam montris kortuŝan piecon. Estante sepjara knabeto, li propravole ĉeestis ĉiutage la sanktan Meson. Adoro de la plej Sankta Sakramento kaj

fila amo al Mario, la Patrino de Dio, estis liaj preferitaj kultoj dum lia tuta vivo. Lia patrino lasis al li plenan liberecon por la elekto de profesio, kvankam ŝi kaj ĉiuj geamikoj klare vidis, ke Dio lin volis al la sankta presbitereco. Efektive Emile en la jaro 1884, tiutempe nur 14-jara, eniris la seminarion en Tours, por tie prepari sin al sia konsekro. Je la fino de la jaro 1893 li fariĝis presbitero.

Pastro Peltier estis inteligenta kaj studema viro. Tial li baldaŭ iĝis tre klera, precipe pri lingvaj sciencoj. Li bone scipovis la anglan kaj germanan lingvojn kaj sufiĉe komprenis la italan, hispanan kaj portugalan. Estinte dum kelke da tempo paroĥestro, li fariĝis en 1904 profesoro en la seminario de Tours, kie li instruis la anglan lingvon. Poste pro malbona sanstato oni nomis lin pastron en Sainte-Radegonde, kie li restis ĝis sia morto.

Kiam la lingvo Esperanto komencis disvastiĝi en Francujo, Pastro Peltier ankaŭ multe interesiĝis pri tiu lingvo kaj ellernis ĝin. Kiel ĉiu vera lingvisto li ekkonis la eblecon de lingvo internacia, kaj kiel filantropo li forte deziris ĝian starigon. Bone komprenante, ke la lingva divers-eco estas ne nur barilo kontraŭ la disvastigo de la vera religio, li ekzamenis senpartie Esperanton, kaj rekonis ĝiajn mirindajn ecojn por venki antaŭjuĝojn, forigi erarojn, kaj interrilati kun disigitaj fratoj. Pastro Peltier ankaŭ tuj antaŭvidis, ke la malamikoj de nia Kredo certe ne malatentos pri tia bonega propagandilo, kaj certe estos uzantaj

ĝin same kiel ili uzadas la preson aŭ la artojn, por ataki la kristanan religion. Ne timante la kontraŭstaron de la malamikoj, nek la mokojn de siaj samreligianoj, tiu kuraĝa pastro senlace laboradis por fine konvinki la katolikojn pri la neceseco uzadi tiun novan armilon por la servo de la katolika religio, kaj dank' al lia sindonemo, penado kaj ofero, eĉ de lia sano, li sukcesis.

Je la fino de 1902, Pastro Peltier dissendis al diversaj plej konataj esperantistoj alvokon kun la demando, ĉu ne jam estus tempo por la katolikaj esperantistoj, organizi sin kaj ekkomenci la eldonadon de propra organo.

La respondoj estis favoraj. Ĉirkaŭ 80 katolikaj esperantistoj promesis al li helpon per monoferoj kaj kunlaborado por la fondota societo. Jam en januaro 1903, Emile Peltier komencis elirigi esperantlingve malgrandan kvarpaĝan verdkoloran aldonon al la franca revueto *L'Aube* (Tagiĝo), sub la nomo de la Societo « Espero Katolika ».

La unua numero de ĉi tiu alportis jam la regularon de la societo « Espero Katolika », kies unua regulo estis esprimita per jenaj vortoj : « La societo « Espero Katolika »..... havas la celon, disvastigi en la katolika mondo per ĉiuj rimedoj eblaj kaj leĝaj la idiomon kreitan de D-ro Zamenhof sub la nomo Esperanto. Ĝi penadas atingi tiun-ĉi celon per la produktado kaj dissemado de ĉiuj katolikaj verkoj en Esperanto. Ĝi organizos ĉie, kie ĝi povos, paroladojn, kunvenojn, kursojn por Esperanto en katolikaj universitatoj, lernejoj, seminarioj, ktp. »

Petante por tiu regularo aprobon de sia eklezia estro, ĉefepiskopo de Tours, Pastro Peltier skribis : « Esperanto estas idiomo neŭtrala. Oni povas ĝin ŝati kiel rimedon por interŝanĝi ilustritajn kartojn aŭ kolektadi postmarkojn. Sed *ni katolikoj* povas konsideri Esperanton kiel mirindan rimedon por faciligi rilatojn kun niaj alilandaj fratoj kaj por realigi la vorton de Nia Sinjoro : « Kaj estos unu ŝafaro kaj unu paŝtanta ».

La episkopo respondis, donante la *unuan eklezian aprobon* al la katolika Esperantomovado :

« Kara Sinjoro,

« Vi postulis mian juĝon pri entrepreno, kiu « cela unuigi la ĉiunaciajn katolikojn per la internacia helpa lingvo nomata Esperanto. *Mi tre « volonte aprobas tiun projekton, kiu ŝajnas « favori la disvastigadon de l' Evangelio kaj la « pliunuigon de l' popoloj.* »

« René François, ĉefepiskopo de Tours.

« La 6 decembro 1902. »

Tiamaniere estis metita fundamento por la plua disvastigado de Esperanto inter la franca kaj alilanda katolikaro. La diversnaciaj katolikoj de tiam estis jam posedantaj sian propran esperantistan societon. La ĉefa zorganto kaj direktoro estis la senlaca Pastro Peltier mem, kiu ĝis somero 1903 klopodis, sen ŝatinda sukceso, por pligrandigi la nombron de la anoj. Li decidis forlasi la societon kaj fondi revuon : *Espero*

Katolika, okpaĝa gazeteto, kies unua numero aperis en oktobro 1903. En marto 1905 ĝi kvarobligis, atinginte amplekson de 32 paĝoj en oktavoformato kun kvarpaĝa verda kovrilo. La nombro da abonantoj (komence nur 300) estis nesufiĉa.

Tiun bedaŭrindan fakton oni povas klarigi per diversaj kaŭzoj. Unue multaj kleraj katolikoj konantaj la lingvon latinan, komune uzatan en la tuta katolika Eklezio, ne sentis bezonon je alia lingvo internacia; due multaj sin daŭre rilatis al Esperanto iom suspekto, rigardante ĝin kiel eltrovaĵon ne-katolikan.

Krom tio, *Espero Katolika* je sia eniro en la mondon ankaŭ ne plaĉis al la tiama gazetaro esperantista, ĉar Pastro Peltier, tiam ankoraŭ estante ne sperta esperantisto, allasis kelkajn ŝanĝetojn pri la lingvo, « plibonigojn », al kiuj pli kaj pli ema estis lia kunlaboranto S-ro Henri Aurox, kompromitante la revuon. Tial en la 5-a numero de 1904, kiam S-ro Aurox estis forlasinta sian oficon, *Espero Katolika* aliĝis al la deklara letero, kiun la aŭtoro de Esperanto estis skribinta al S-ro Seynaeve, direktoro de la *Belga Sonorilo*, unu el la tiamaj dek esperantistaj gazetoj (1), kaj de tiam ĝi montriĝas al la mondo

(1) « Simile al ĉiu alia lingvo, Esperanto devas esti rigardata kiel lingvo finita kaj netusebla. Paroli pri iaj plibonigoj (se ili estos efektive necesaj) ni povas nur tiam, kiam nia lingvo estos jam oficiale akceptita en la tuta mondo. Ĝis tiu tempo la netusebleco de la lingvo estas la plej fundamenta kondiĉo por nia propagando ».

kiel *internacia monata pure katolika* (1) *gazeto, redaktata en la pura Zamenhofa Esperanto.*

Krom la internacia gazeto Pastro Peltier konsideris pli intiman interkonatiĝon kaj pli oftan interparoladon kun alilandaj katolikaj esperantistoj kiel la plej bonan rimedon por puŝi antaŭen la Katolikan Esperanto-Movadon.

Efektive jam rondoj, grupoj, apartaj esperantistoj komencis interkomunikiĝi : personaj vojaĝoj kaj vizitoj baldaŭ formiĝis en interurbaj kaj regionaj kunvenoj. Kaj kiam en *Calais* kaj *Dover* en la jaro 1904 kunvenis ne nur francoj el najbaraj urbetoj, sed ankaŭ anglaj, germanaj, aŭstraj kaj belgaj esperantistoj, la kunveno nomiĝis jam *kongreso*, kaj estis antaŭsigno de la *unua jam vere internacia Bulonja Kongreso en 1905.*

Laŭ decido kaj invito de la *Calais'a* kaj *Dover'a* grupoj, la 5 aŭgusto 1905 venis ĉirkaŭ milo da diversnaciaj esperantistoj el 30 diversaj landoj de la nova kaj malnova kontinentoj en la francan urbon *Boulogne-sur-Mer*. Multaj el ili dum longa vojaĝo certe ne estis liberaj de timo, simila al tiu, kiun devas senti elpensuloj aŭ eltrovistoj, kiam ili la unuan fojon faras praktikan provon de maŝino aŭ aparato, rezultato de iliaj longaj penoj kaj laboroj.

(1) Ne..... revuo lingva, sed tribuno malfermita al ĉiuj por libera, pacema diskutado de ideoj, precipe religiaj. Ni *celas unuigi, ne disigi*, laŭ parolo de Kristo : « Vero liberigos vin ». (E. K. 1904, N-ro 5.)

En esperantaj journaloj oni jam de longe ja legis interesajn rakontojn pri vizitoj, interparoladoj, diskutoj de diverslandaj esperantistoj. Sed tio estis nur privataj paroladoj, dum kiuj la parolantoj estis certe indulgemaj unu por alia, helpis sin diversmaniere por reciproka kompreniĝo, kaj la priskriboj de tiuj renkontoj servis por propaganda celo, en kiu iom da pligrandigo estis permesita. Sed nun, en granda publika kunveno, antaŭ tiom da diverslingvanoj, ĉu Esperanto eltenos tiel seriozan provon? Ĉu ĝi montrus sin taŭga por tiu grava tasko?... Jen, ĉiuj timoj, ĉiuj duboj malaperis subite kaj plene tuj de la unua momento de la malfermo de la kongreso. Post la unuaj vortoj de Ludoviko Zamenhof, potenco ondo de entuziasmo diskuris tra la tuta ĉambrego de la Bulonja urba teatro, plena de kongresanoj. La ĉeestantoj ne povis atendi la finon de la parolado de la Majstro, kaj interrompis ĝin ofte per laŭtaj aplaŭdegoj. Ili ne povis reteni triumfan krion de tiu ideo, kiun ĉiuj profunde portis en siaj koroj, kaŝita eble jam de multaj jaroj. Jes, en tiu-ĉi momento triumfe realiĝis la ideo de lingvo internacia ; francoj, angloj, germanoj, poloj, kanadanoj, meksikanoj., eksentis ĉiuj samtempe, ke la lingvo, kiun parolis al ili Zamenhof, estas jam ilia lingvo, kvankam ili ellernis ĝin en plej diversaj kaj malproksimaj anguloj de la tero, kaj kvankam multaj eble neniam ankoraŭ aŭdis ĝin parolatan ! Ili eksentis veran, fortan ligilon inter si ĉiuj ; ili eksentis, ke en tiu momento la mondo, dispartigita en fremdajn, mialamikajn,

suspektajn hordojn, faris fortan, kuraĝan paŝon al tuthoma frateco.

En tiu glora festo internacia Zamenhof prave diris, ke « la unuan fojon en homa historio ni, membroj de malsamaj popoloj, staras unu apud la alia, ne kiel fremduloj, sed kiel fratoj, ĉar hodiaŭ kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj! Benata estu la tago! Grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj! » (A. Zakrzewski, Historio de Esperanto 1887-1912). Tiun gloran Unuan Universalan Kongreson de Esperanto partoprenis ankaŭ multaj katolikaj esperantistoj, alvokitaj de Pastro Peltier, kaj profitis tiel oportunan okazon por havi specialan kunvenon, kaj *la unuan fojon pritrakti en unu komuna lingvo* siajn aferojn.

La 6 aŭgusto la katolikaj esperantistoj ĉeestis Sanktan Meson en la preĝejo S. Nicolas, al kiu estis invititaj ĉiuj kongresanoj. Tio estis la *unua katolika Esperanto-Diservo*, kiun ĉeestis ankaŭ D-ro Zamenhof. La esperantistoj esperis, ke ili aŭdos ankaŭ Esperanto-predikon de Pastro Peltier, sed la episkopo de Boulogne tiam ankoraŭ ne permesis esperantlingve prediki.

Dum la Unua Universala Kongreso de Esperanto la katolikoj konvinkigis pri la utileco de komuna interkonsiliĝo, kaj partoprenis en 1906 ankaŭ la Duan Universalan Kongreson, kiu okazis en la svisa urbo Genevo.

En printempo de la jaro 1906 Pastro Peltier ricevis leteron de S-ro de Beaufront, kiu skribis al li: « Sendu rapide plenan kolekton de *Espero*

Katolika al Sinjoro profesoro Luigi Giambene en Romo. Li prezentos ĝin al Lia Papa Moŝto kun mia preĝareto ». Peltier tuj obeis ĝoje, kaj la 2 junio al prelato Giambene, tiutempe sekretario de la Roma grupo Esperantista « Imperiosa Civitas », estis konsentita privata aŭdienco de Pio X-a.

Tiun saman tagon la prelato skribis al Pastro Peltier: « La Sankta Patro tre afable ricevis min hodiaŭ. Li akceptis mian laboraĵon. Li laŭte legis la poemon de Pastro Dombrovski (« Ĉesis jam viva malgajo publika »), kiu estas en la unua numero de *Espero Katolika*, dirante ĉe ĉiu verso: « Mi komprenas! » Mi prezentis Esperante skribitan peton je beno por Vi kaj la redaktoroj de E. K. Ankaŭ ĝin Li laŭte legis, kaj poste diris: « Mi ne skribas nun, sed mi sendos al vi skribaĵon pri tio ». Sendube tio estas gravega dokumento. Sed estas necese, ke ni ankoraŭ silentu, preĝu kaj esperu! »

Peltier atendadis.....

La 27 aŭgusto, akurate en la malfrua tago de la Dua Universala Kongreso de Esperanto en Genevo, li ricevis kopion de letero, sendita al prelato Luigi Giambene. Jen la Esperanta traduko de la itallingva originalo:

El la Vatikano, la 27-an de junio 1906.

Via tre respektinda Monsinjora Moŝto.

Mi ricevis la honoran komision, sciigi al Vi, ke la Sankta Patro *favorabile* kaj *kun speciala plaĉo* bonvolis akcepti la aperintajn numerojn de l' Revuo *Espero*

Katolika, kiun Vi humile prezentis al Li je la nomo de la Pastro Emilo Peltier. Bonvolu Via tre respektinda Monsinjora Moŝto konigi al la nomita Pastro la *Papan plaĉon*, kaj komuniki al li la *Apostolan Benon*, kiun Lia Sankta Moŝto donis al li kaj al la redaktoroj de la *Revuo*.

Plenuminte la ricevitaĵn ordonojn kun la sentoj de grandega estimo, mi diras min

De Via respektinda Moŝto

Tre sindonema Servanto

GIOVANNI BRESSAN.

Al Lia tre respektinda Moŝto

Monsinjoro Luigi Giambene, Romo.

La grandega novaĵo rapide dissemiĝis ne nur inter la katolikoj, kiuj partoprenis la kongreson, sed inter ĉiuj kongresanoj, kaj Pastro Peltier ricevis multe da afablaj gratuloj. Laŭ la deziro de multaj esperantistoj, la letero de Lia Papa Moŝto estis legata de la prezidanto de la kongreso, la protestanta pastro Schneeberger, dum la ĝenerala kunsido. « Niaj amikoj, la katolikoj, diris la prezidanto, ricevis de la Papo *altan aprobon*, kiun mi komunikas al la kongreso. » La legado de la letero estis salutata per unuanimaj kaj longaj aplaŭdoj. S-ro Carlo Bourlet, kvankam liberpensulo, deklaris, ke *tiu fakto estas tre grava por la progresado de Esperanto*. Li esprimis la deziron, ke la anoj de aliaj religioj kaj filozofioj same klopodu por ricevi similan aprobon de la estroj, por montri, ke Esperanto estas *vere neŭtrala lingvo, kiu povas kaj devas utili al ĉiuj partioj kaj ideoj*.

Peltier mem ne eĉ unu momenton konsideris la Apostolan Benon kiel kuraĝigon al li persone donitan, sed *kiel supernaturan helpon, kiel altan aprobon de la celo de Espero Katolika: utiligi Esperanton por la dissemado de la Katolika Vero, kaj por la frata unuigo de ĉiuj homoj en unu safaro*. De nun li sentadis sin pli forta por la granda laboro, li sentadis, ke li povos, ke li devos iri antaŭen. Kaj li iris sentime kaj senlace ĝis sia morto.

Alia grava okazintaĵo en la Ĝeneva Kongreso estis la *oficiala permeso* de la ticia Ĝenerala Vikario *por la prediko* en Esperanto dum la Sankta Meso, kiu estis solene dirata en la preĝejo de Sankta Francisko la 2 septembro 1906. Post la legado de la Evangelio Pastro Peltier *la unuan fojon en la mondo predikis en Esperanto*. Emocio kompreneble vidigis sur lia vizaĝo, kiam li supreniris al la predikejo.

Tiuj du faktoj, precipe la granda intereso, kiun Papo Pio X-a havis por la poste oftfoje de Li benita Katolika Esperanto-Movado, malgrandigis videble la nombrojn de kontraŭuloj. La katolikaj kongresanoj disiris spirite fortikigitaj, kaj ĉiu el ili fariĝis pioniro de la Katolika Esperanto-Movado, kiu post la Ĝeneva kongreso ĉie ekfloris, eĉ en tre malproksimaj landoj.

En 1907 la katolikaj esperantistoj ankaŭ partoprenis la Trian Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis de la 12 ĝis la 17 aŭgusto en Cambridge. Tie laŭ projektoj de Pastro Austin Richardson kaj de Pastro Peltier en ilia ĝenerala

kunveno estis fondataj *novaj* katolikaj organizaĵoj : 1. « Societo Katolika Internacia » (S. K. I.); 2. « La Abelo Esperantista » aŭ amika unuiĝo de katolikaj komercistoj kaj industriistoj, por faciligi al ili komercajn internaciajn rilatojn; 3. « Pastra Esperantista Frataro » (P. E. F.), havanta la celon, unuigi la katolikajn pastrojn diversnaciajn por faciligi inter ili per Esperanto rilatojn pri pastraj sciencoj kaj ĉiuspecaj religiaj aferoj.

Pastro Peltier pro malsano ne ĉeestis la kongreson. En la ĝenerala kunveno estis nur legata lia letero, en kiu li sciigis pri la intencata fondo de sia esperanta presejo.

Ankaŭ la Kvaran Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis la 17-22 aŭgusto 1908 en Dresden, la malsana ĉefo de la katolikaj esperantistoj ne povis partopreni. Sentante la alproksimiĝantan morton, li rapidis organizi redakcian komitaton de E. K., kaj transdonis al ĝi sian revuon. La nova komitato resumis la celon de tiu-ĉi revuo per tri vortoj : *Espero Katolika* estas gazeto : 1^o katolika, 2^o esperantista, 3^o agada, — kaj plenumante tiun-ĉi promeson, ĝi tuj anoncis la daton de la Kvina Universala Esperanto-Kongreso en Barcelona, kaj invitis la katolikojn, ke ili grandnombre partoprenu en ĝi.

En la komenco de la jaro 1909 mortis Pastro Peltier. Jam de du jaroj li suferis pro stomaka malsano. Timante la malvarmon li foriris al Pau, kaj post tri monatoj li deziris, ke oni konduku lin al Lourdes. Estis lia deziro, tie ricevi de la

Sankta Virgulino resaniĝon aŭ morti apud tiu sanktega Patrino.

En julio 1908 li ankoraŭ ĉeestis la solenajn jubileajn festojn (de la 14 ĝis la 16), sed li ne povis plene ĝui ilin. Li revenis el Lourdes ne resanigita. « La Dia Providenco, li tiam skribis, elektas mem la tagon kaj la horon por Sia bonfaremo; oni devas submeti sin al Lia senerara saĝeco. Tamen... mi konservas la esperon, ke dum la alia pilgrimo la sankta Dipatrino plene resanigos min. » La saĝeco de Dia Providenco alie decidis : Pastro Peltier mortis en Lourdes apud la Sanktega Virgulino, la 17 februaro 1909. Ĝis la lasta horo li konservis sian plenan submetiĝon al la volo de Dio. La daŭrigo de la komencita laboro, fideleco al lia revuo, por ke efektiviĝu la unuiĝo de la kristanoj per la lingvo Esperanto, tio estis lia lasta deziro. « Mia Dio, mi prezentas al Vi mian vivon por Franclando, por mia revuo *Espero Katolika*, kaj por tiuj, kiuj preĝis aŭ preĝos por mia animo », estis liaj lastaj vortoj.

La korpo de Pastro Peltier, la energia iniciatinto de la Katolika Esperanto-Movado, ripozas en la urba tombejo de Lourdes. Sur lia modesta tombo oni starigis ŝtontabulon el blanka marmoro kun la simpla gravurita surskribo : « Abbé Emile Peltier » kaj la dato de lia morto. Nenio plua. Sed la katolikaj esperantistoj ne bezonas ion alian por ĉiam memori kaj honori la bravan probatalinton, kies revo pri « Katolika Unuiĝo Esperantista » baldaŭ post lia morto efektiviĝis,

por daŭrigi ĝis plena triumfo la noblan laboron, kiun li kuraĝe entreprenis por Dio kaj por la homaro.

La lokon forlasitan de Pastro Peltier okupis novaj junaj batalantoj, inter kiuj precipe memorinda estas Claudius Colas. Li ne nur daŭrigis lerte la redaktadon de *Espero Katolika*, sed eĉ fondis novan organizaĵon, nomitan « Katolika Esperantista Oficejo ». Plej energie li agadis por altiri plejble multajn katolikojn al la Kvina Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Barcelona la 5 ĝis la 11 septembro 1909. Dum tiu kongreso la katolikoj dekfoje kunvenis, ĉu por preparoli la estontan programon kaj esplori la irotan vojon, ĉu por suprenaltiĝi al Dio en komuna lingvo la preĝojn de la koroj jam unuigitaj per la sama Kredo kaj sama espero.

El la decidoj de la Barcelona kunveno la plej grava estas la jesa solvo de la demando pri la utilo kaj neceso kunvoki en *Parizo* dum la printempo 1910 la *unuan kongreson de katolikaj esperantistoj*, kaj fondi *tutmondan societon de katolikaj esperantistoj*, al kiu oni donis la nomon *Katolika Unuiĝo Esperantista* (K. U. E.). Pastro Marko Lliró, ano de la hispanaj Piaristoj, skizis regularon por tiu Unuiĝo, kaj Pastro Austin Richardson estis nomita ĝia unua prezidanto.

Kvar tagojn post la fermo de la V-a Universala Kongreso, la 15 septembro, pro la oktago festa de la Sankta Virgulino, la vasta preĝejo de la historie fama abatejo, konstruita preskaŭ mirakle

inter la krutaj rokegoj de Mont Serrat, estis tute plena de fideluloj. Dum la Sankta Meso predikis en Esperanto Pastro Marko Lliró. Je la fino de la prediko Pastro A. Richardson per solena beno inaŭguris la standardon de K. U. E. Post la Meso S-ro Claudius Colas, la ĉefredaktoro de E. K., prenis la benitan flagon per sia mano, kaj, sekvata de aro da fideluloj, li marŝis ĝis sur la kortego de la abatejo. Tie li haltis, donis la standardon al Pastro Richardson, kaj komencis paroladon, el kiu estu eltiritaj nur jenaj frazoj : « En la tempo, kiam provincoj batalis kontraŭ provincoj, ekzistis homoj, kiuj super provincaj disputoj starigis pacan signon; ili predikis al la interbatalantoj la unuiĝon ĉirkaŭ nova signo, kiu estis la simbolo de pli granda amo : la standardo nacia, simbolo de la amo patruja. Hodiaŭ homoj ankaŭ levigas, kiuj flirtigas super interpopolaj malkonsentoj novan standardon, simbolon de pli-granda amo. Tiuj homoj estas esperantistoj, tiu nova signo estas la *verda standardo*. »

Klarigante la signifon de tiu standardo, li montris, ke la ideo de internacia frateco, signita per ĝi, havas sian veran fonton en la Evangelio, en tiu parolo de Kristo : « Vi amu unu la alian ! » Poste li klarigis al la *katolikoj*, ke ili devas pli ol aliaj labori por la tutmonda frateco. Ĉio en la katolika religio predikas tiun fratecon. Do ili unuiĝu sub la komuna signo nun benita, kaj laboru por la plenumo de la devigo skribita sur ĝiaj faldoj. Al la *nekatolikaj* samideanoj li diris : « Ne ridu ! Ne moku nin, ĉar nian komunan sim-

bolon, ĉar nian amatan standardon ni alportis ĉi-tien piede de religia altaro, piede de la antikva Montserrata Virgulino. Ne moku, ĉar ĝin ni benigis de la pastro. Ni kredas, ke ni ĉiuj estas fratoj, kaj ke frateco supozigas komunan patron kaj komunan patrinon. Ne opiniu, ke pro tio ni estas malpli bonaj apostoloj de la universala frateco. *Ni kune laboru, vi nekredantoj, kaj ni kredantoj, laŭ la signifo de nia verda simbolo, en reciproka estimo, amo, toleremo; ni kune laboru por la komuna celo, kiu bezonas laboron de ĉiuj.* »

Kaj, turnante sin al la standardo, li finis: « Vi, simbolo amata, simbolo dufoje benita, ne timu! Vin tre alte ni tenos, ho verda standardo! Vi ĉeestos en niaj bataloj, kaj la venkojn, kiujn per oraj literoj ni enskribos sur Vi. Ili ne estas tiuj, kiuj plorigas patrinojn kaj faras virinojn senedzaj, aŭ junulinojn senfianĉaj... La venkoj, kies nomojn Vi portos sur Viaj silkaj faldoj, estos venkoj de amo kaj paco: ĝojigaj benotaj venkoj, kiuj, multfoje repetitaj, kondukos la homaron al la feliĉo kaj al la plenumo de nia devizo: « Unu ŝafaro kaj unu paŝtanta. »

Poste la standardo estis reportata en la sanktejon kaj deponata antaŭ la piedoj de la antikva statuo de Mario sur la granda altaro. Kaj laŭ la bela hispana kutimo ĝi restis tie dum la tuta nokto. La sekvantan tagon, post la matena Meso ĝi estis reprenata, kaj de tiu tempo ĝi flirtis kaj estonte ĝi flirtos meze de ĉiuj katolikaj festoj kaj kongresoj.

La Barcelona Kongreso, kiu estis ne nur plena sukceso, sed vera triumfo por la Katolika Esperanto-Movado, kaj la Montserrat'a benfesto signifas al la katolikaj esperantistoj la gloran finon de dudekjara celkonscia pionira laboro, kaj la esperplenan komencon de nova tempo, de tiu granda estonto, kiun la plej supera Paŝtanta, Papo Pio X-a, la 4 aprilo 1909, profete antaŭdiris per la vortoj: « Esperanto havas antaŭ si grandan estonton ».

Pastro FRANCISKO MEŜTAN.



ESTRARO DE I. K. U. E.

Ĉefestraro

Prezidanto : Pastro J. FONT-GIRALT, profesoro, Seminario-Kolegio de S. Maria del Collell, Gerona-Bañolas (Hispanujo).

Vic-prezidanto : F-ino LARROCHE, 55, rue de Vaugirard, Paris VI (Francujo).

Sekretario-Kasisto : S-ro P. A. SCHENDELER, Prins Hendrikstr. 30-e, Eindhoven (Nederlando).

Vic-sekretario-kasisto : S-ro J. E. HOOKHAM, 45, Holmesdale Road, Teddington (Anglujo).

Oficiala Organo

ESPERO KATOLIKA

Redaktoro : Pastro G. RAMBOUX, 22, cours Albert-I^{er}, Paris VIII.

Administracio : F-ino LARROCHE, 55, rue de Vaugirard, Paris VI.

Internacia Komitato

a) Ligaj membroj :

Por *Anglujo* : Pastro O. STANFORTH, O. S. F. C., Franciscan Monastery, Olton (Birmingham).

S-ro G. WATCHURST, 6, Gracedale Road, Streatham, London S. W. 16.

Por *Aŭstrujo* : Pastro NEDWID WOLFGANG, Freyung 6, Wien I.

S-ro (?).

Por *Ĉeĥoslovakujo* : Pastro D-ro L. SCHINDLER, Gabelsbergerstrasse, Tetschen a/Elbe.

Pastro D-ro A. ELTSCHKNER, metropola kanoniko, Praha IV.

Por *Francujo* : Pastro C. DUVAUX, paroĥestro, 19, rue des Abbesses, Paris XVIII.

Pastro G. RAMBOUX, 22, cours Albert-I^{er}, Paris VIII.

Por *Germanujo* : Pastro E. BECKER, paroĥestro, Altbüßerstr. 34, Breslau.

S-ro (?).

Por *Italujo* : Pastro M. CAROLFI, Cortemaggiore, Piacenza.

S-ro Prof. E. PIZZI, R. Biblioteca Naz. di S. Marco, Venezia.

Por *Nederlando* : S-ro P. HEILKER, Hoofddorp.

Pastro C. PRELLER, O. P., Kerkegasse, 8, Nijmegen.

b) Individuaj membroj :

Por *Algerio* : S-ro P. COUFFINHAL, place des Mûriers, Relizane (dep. d'Oran).

Por la *Antiloj* : Pastro Wilfred BROENS, Siparia, Trinidad.

Por *Argentino* : F-ino HERME AGUIRREBURUALDE, Arroyo 909, Buenos-Ayres.

Por *Aŭstralio Okcidenta* : S-ro P. LEAHY, 36, Royal Street, E. Perth.

Por *Belgujo* : F-ino ASSENMACHER, 50, rue des Minières, Verviers.

- Por *Danujo* : S-ro F. KEYL, Halmtrovet, 40, Kopenhagen.
- Por *Hindujo Nederlanda* : S-ro G. L. BLOT, Bandjaran, Kediri (Java).
- Por *Hispanujo* : S-ro J. ZUGAZAGA, Galdacano (Vizcaya).
- Por *Hungarujo* : Pastro J. KOZMA, Nyiresezari (Szatmarl.).
- Por *Irlando* : F-ino K. MURPHY, 8, Woodville Terrace, Botanic Avenue, Drumcondra, Dublin.
- Por *Jugoslavujo* : S-ro A. DE SIGETI, Batori, 33, Novisad.
- Por *Litovujo* : S-ro K. J. KOJELIS, Vieksneliai, Luoke.
- Por *Palestino* : S-ro T. H. E. BAXTER, Latin Patriarchal School, Ramallah.
- Por *Polujo* : Pastro P. JANIK, vikario, Chorzow (Silezio).
- Por *Skotujo* : S-ro A. Mc KINNEY, 10, Nicolson Street, Edinburg.
- Por *Svisujo* : S-ro MISTLER, Villa St.-Jean, Fribourg.
- Por *Tasmanio* : S-ro P. LONERGAN, 51, Duke Street, Hobart.
- Por *Urugvajo* : S-ro R. ZEBALLOS MORALES, Cerro Largo, 1748, Montevideo.
- Por *Venezuelo* : Pastro P. HOFFMANN, O.S.B. San José del Avila, Caracas.



MEMBROLISTO



AFRIKO

ALĜERIO

- S-ro Pierre CARRIÈRE, Bu-Nuara (Constantine).
S-ro P. COUFFINHALL, place des Mûriers, Relizane (Oran).
S-ro Félicien PALENC, Lannoy, près Jemmapes (Constantine).

AMERIKO

AMERIKO MEZA

Antiloj :

- Pastro Wilfred BROENS, Siparia, Trinidad.
S-ro Laurence GONSALVES, P. O. Box 22, Kingston, St-Vincent.

AMERIKO SUDA

Argentinoj :

- F-ino Herme AGUIRREBURUALDE, Str. Arroyo, 909, Buenos-Ayres.

Urugvajo :

- S-ro Luis Antonio BELTRAME B., Uruguay 1491, Montevideo.
S-ro Romulo ZEBALLOS MORALES, Cerro Largo, 1748, Montevideo.

Venezuelo :

Pastro **HOFFMANN**, O. S. B., San José del Avila,
Caracas.

AÜSTRALIO

AÜSTRALIO OKCIDENTA

S-ro **P. LEAHY**, 36, Royal Street, E-Perth.

TASMANIO

S-ro **P. LONERGAN**, 51, Duke Street, Hobart.

AZIO

HINDUJO NEDERLANDA

F-ino **J. L. BLONDEAU**, Ngapasan 7, Jogjakarto
(Java).

S-ro **G. L. BLOT**, Bandjara, Kediri (Java).

S-ino **P. BLOT-v. ZUTPHEN**, Bandjara, Kediri (Java).

S-ro **J. v. BOEKHOUDT**, Jogjakarto (Java).

S-ro **J. C. A. DE KOK**, Jogjakarto (Java).

S-ro **A. C. MATTHEE**, Jogjakarto (Java).

S-ro **F. P. H. SALDEN**, Jogjakarto (Java).

F-ino **L. A. TURK**, adr. : S-ino **J. SANDERS**, Ka-
dasterstr. 5-a, Jogjakarto (Java).

S-ro **Ed. VERMEULEN**, Semarang (Java).

S-ro **G. K. v. ZUTPHEN**, oficisto **D. P. Mij**, Balik-
papan (Borneo).

F-ino **J. M. v. ZUTPHEN**, Pati (Java).

PALESTINO

S-ro **T. H. E. BAXTER**, Latin Patriarchal School,
Ramallah.

EÜROPO

ANGLUJO

S-ro **F. H. ANDREWS**, 30, Duffield Rd, Irlam Oth
Height, Manchester.

S-ro **W. ARENDELL**, 55, Leopold Building's, Hack-
ney Rd, London E 2.

S-ro **Michelino DI BARRO**, Park Prewett Hospital,
Basingstoke (Hants).

Frato **BASIL**, F. S. C., De la Salle College, Scott
Rd, Sheffield.

Frato **BENEDICT**, F. S. C., De la Salle College,
Scott Rd, Sheffield.

S-ro **Arthur BRENNAN**, 62, North Rd, Wallsend
on Tyne.

S-ro **J. BRENNAN**, 62, North Rd, Wallsend on Tyne.

F-ino **M. O'BRIEN**, 104, Upper Wormacott Rd,
Longton (Staffs).

S-ro **P. LE BRUN**, 5, Parliament Hill Mansions,
Highgate Rd, London N. W. 5.

F-ino **T. M. CLARK**, c/o Mrs. Anthony, Tresenna
Cottage, Tresenna Terrace, St. Ives (Cornwall).

S-ro **E. J. CLOWERY**, 4, Salomons Rd, off Beokton Rd,
Plaistow, London E. 13.

S-ino **M. COLLINS**, Talbot House, 43, St. Mary's
Terrace, Hastings.

Pastro **Joseph O'CONNOR**, St. Augustine's Tun-
bridge Wells (Kent).

S-ro **M. E. O'CONNOR**, 2, Imperial Chambers,
Mason St., Old Kent Road, London S. E.

S-ro **H. CORLEY**, F. S. C., De la Salle College,
Scott Road, Sheffield.

S-ro **R. J. DADD**, Old Lime Works, Reigate (Surrey).

F-ino **DANKS**, 3, Moyser Rd, Streatham, London
S. W. 16.

- Pastor R. A. DAVIS, Twyford Abbey, Willesden, London S. W. 10.
 F-ino W. Mc DONNELL, 18, Marsdon Street, Wann Wen, Cwmbwrla (Swansea).
 S-ro Leo DUKES, 123, Chester Road, Watford (Herts.).
 S-ino S. ELLIOT, B. M./F. F. L. P., London W. C. 1.
 S-ro W. J. EMMS, 66, Pentre Gardens, Cardiff.
 S-ro W. EVERTON, Seventyseven, Charlotte Str., Walsall.
 S-ro Philip FISHER, 6, Chillingworth St., Cheetham Hill (Manchester).
 S-ro H. FRANKS, B. S., 48, Worthings St., Hull (E. Yorks.).
 S-ro Lt. Col. J. EFRENCH-MULLEN, C. S. I., C. I. E., c/o T. Cook & Son, Bankers, Berkeley Street, London W. 1.
 S-ro T. GATES, 50, Greenwich Rd., Croydon (Surrey).
 S-ro Alban GILES, Twyford Abbey, Willesden, London N. W. 10.
 S-ro E. F. GRAY, Kings Rd, Assisi, Alton (Hants).
 S-ro T. J. GUERITTE, Plaisance, Claremont Gardens, Surbiton (Surrey).
 S-ro W. J. HARRIOT, 6, Chesnut Ave., Monkseaton (Northumberland).
 S-ro J. E. HART, 24, Trafford Rd, Thornton Heath (Surrey).
 S-ro A. E. HEPTON, 89, Graftonstr., Hull.
 S-ro G. H. HILL, 98, Wardour St., London W. 1.
 S-ro J. E. HOOKHAM, 45, Holmesdale Rd, Teddington (Middlesex).
 S-ro S. T. JENKINS, 140, Waldo Avenue, Fulham, London S. W. 6.
 S-ro J. L. M. JENNER, 20, Kimberley Terrace, Llanishen (Cardiff).
 S-ro John KENARD, 59, Lansdowne Hill, West Norwood, London S. E. 24.
 S-ro C. W. KING, 75, Wandsworth Bridge Rd., London S. W. 6.

- S-ro J. F. LAKER, 89, Ashbourne Rd, Mitcham (Surrey).
 F-ino E. A. MANN, B. Sc., 87, Earlham Grove, Forest Gate, London E. 7.
 S-ro H. MATTHEWS, 1, Victoria Villas, Netley Abbey (Southampton).
 S-ro John MOORE, 10, Fitzgerald Street, Manchester Road, Bradford (Yorks.)
 F-ino V. MOULD, St. Faith's, Broadstairs (Kent).
 F-ino M. M. MURRAY, 42, Wilton Crescent, Wimbledon, London S. W. 19.
 S-ro C. ORMEROD, 150, Spa Rd, Bolton (Lancs.).
 Pastor R. B. PRIMAVESI, O. S. B., St. Peter's, Seel St., Liverpool.
 F-ino G. Mc QUILLAN, 331, Spring Bank, Pemberton, Wigan (Lancs.).
 F-ino F. O'RIORDAN, 39, Sydney Street, Chelsea, London S. W. 3.
 S-ro J. F. SMEE, 28, Gladys Rd, West Hampstead, London N. W.
 S-ro F. SPAUL DOO, 4, Hampton Place, Brighton (Sussex).
 Pastor Oswald STANFORTH, O. S. F. C., Franciscan Monastery, Olton (Birmingham).
 S-ro F. W. STANNARD, 76, Marlborough Road, Norwich.
 S-ro J. F. D. THOMAS, 13, Avenue Rd., Dover (Kent).
 F-ino E. THOMPSON, 21, Devonshire Rd, Eccles (Manchester).
 F-ino E. M. J. WALLS, 6, Bristol Avenue, Saltburn-by-Sea (Yorks.).
 F-ino A. WALSH, 251, New Hall Lane, Preston (Lancs.).
 S-ino WATCHURST, 6, Gracedale Rd, Streatham, London S. W. 16.
 F-ino A. WATCHURST, 6, Gracedale Rd, Streatham, London S. W. 16.
 S-ro G. WATCHURST, 6, Gracedale Rd, Streatham, London S. W. 16.

Pastro A. H. WILLIAMS, Rowley Lodge, Rowley Green, Barnet (Herts.).
S-ro J. F. WOODS, Solesmes, Formby (Liverpool).

AÜSTRUJO

S-ro S. ANREITER, Grabenstrasse 39, Graz.
S-ro F. APFELTHALER, Lechnerstrasse 8, Wien III.
F-ino K. APPOYER, Ruedlgasse 88, Ternitz, N. Ö.
F-ino A. BAIER, Albrechtoberggasse 7, Wien XII.
F-ino M. BERGER, Ortsstrasse 13, Inzersdorf, N. Ö.
S-ino K. BERSCHNAK, Wickenburggasse 12, Graz.
F-ino B. BETZWAR, Starhembergasse 27, Wien IV.
S-ro F. BISCHOF, Blindengasse 28, Wien VIII.
S-ro H. BÖHM, Buchfeldgasse 9, Wien VIII.
F-ino G. BÖSL, Hauptstrasse 114, Wien III.
F-ino E. BRAND, Hütteldorfstr. 86, Wien XIII.
F-ino L. BRANDHUBER, Sennefeldergasse 11, Wien X.
Pastro J. BRUGGRABER, Pernegg (Steinmark).
S-ro W. BUBENIK, Gumpendorferstr. 39, Wien VI.
S-ro F. BUCHEGGER, Grabenstrasse 29, Graz.
Pastro P. BUND, parohestro, Burgau.
S-ro G. BUXBAUM, Joching i/d Wachau (N. Ö.).
F-ino R. ČAPEK, Schönbrunnerstrasse 87, Wien V.
F-ino E. ČEPOŇ, Schulgasse 68, Wien XVIII.
F-ino M. CHARUSA, Herzgasse 18, Wien X.
S-ro L. CHIBA, Schaumburggasse 5, Wien IV.
S-ino L. CHIBA, Schaumburggasse 5, Wien IV.
Pastro D-ro CHRISTANELL, Parscherstrasse, Borromäum, Salzburg.
S-ro A. DEISTLER, Schottenfeldgasse 91, Wien VII.
S-ro C. DISCHER, Canisiusgasse 21, Wien IX.
F-ino M. DITTRICH, Darwingasse 22, Wien II.
S-ro F. DOBROZEMSKY, Halbgasse 3, Wien VII.
S-ro K. DÜRSCHMID, Heinrichstrasse 29, Graz.
S-ro K. DWORSCHAK, Keinergasse 37, Wien III.
S-ro R. ECKERT, Stiftgasse 8, Wien VIII.
S-ro EHRHARD, Schlachthausgasse 54, Wien III.

F-ino M. ERARD, Alxingergasse 2, Wien X.
S-ro F. ETL, Matzingerstrasse 19, Wien XIII.
Pastro H. FAHNL, Teyberggasse 13, Wien.
S-ro A. FASSMANN, Seegraben b/Leoben (St.)
S-ino D-ro B. FLASCH, Gentzgasse 7, Wien XVIII.



Pastro Meštan (1), Pastro Nedwid (2), S-ro Chiba (3), pioniroj de nia movado en Wien.

S-ro F. FOCKER, Gumpendorferstr. 39, Wien VI.
S-ro R. FOLTANEK, Ballgasse 6, Wien I.
S-ro J. FORMANEK, Brünnerstrasse 20, Wien XXI.
S-ro D-ro K. FRIEDL, Muchargasse 31, Graz.
S-ro H. FRISCHER, Hilnteichstrasse 19, Graz.
Pastro F. FUCHS, Königsbrunn a. Wagram (N. Ö.)

S-ro F. GARTLER, Schulgasse 24, Graz.
 S-ro K. GASPERINI, Trauttmannsdorf, 4, Wien XIII.
 S-ro J. GLANZ, Kindermannngasse 13, Graz.
 Pastro J. GLEIXNER, Schloss Rosenau apud Zwettl (N. Ö.)
 S-ro A. GRIENDL, Simondenkgasse 8, Wien IX.
 F-ino A. GRIENDL, Simondenkgasse 8, Wien IX.
 S-ro A. GRÖSSING, Eggenbergerstrasse 20, Graz.
 S-ro K. GRUBER, Messenhausergasse 10, Wien III.
